

### VIZITO AL MUZEO TORRES QUEVEDO

Malgraŭ la festa periodo meze de la monato, aprilo estos plenplena de aktivadoj por ĉiuj interesitoj en la internacia lingvo.

La unua okazos la 4an de aprilo, ĉar MEL organizis komunan viziton al muzeo, kiun la universitato Politeknika de Madrido muntis antaŭnelonge en la Altlernejo pri Vojoj, dediĉita al la hispana inĝeniero kaj inventisto Leonardo Torres-Quevedo. Ĝi estas malgranda, sed tre interesa, ĉar ĝi havas ekzemple kaj interalie la unuan aŭtomatan ŝakmaŝinon konstruitan en la mondo. Vidu informon ĉe: <http://www.upm.es/UPM/MuseosUPM/MuseoTorresQuevedo>.

Memoru ke Leonardo Torres-Quevedo estis esperantisto, kaj tion MEL reliefigis en la peto pri komuna vizito. La viziton gvidos por ni esperantistoj la direktoro de la muzeo mem. Ĝi okazos la ĵaŭdon 4an de aprilo, je la 17,30 horoj.



La adreso estas: Escuela de Caminos. C/ Profesor Aranguren, 3 (Ciudad Universitaria). Ni rendezuos ĉe la pordo de la altlernejo je la 17,25; grupo kolektiĝos je la 17,10 ĉe la elirejo de la metrostacio Ciudad Universitaria.

Se vi deziras sciigi al neesperantistoj, ili ankaŭ estas bonvenaj (la vizito okazos en la hispana), sed notu ke estas limigita nombro da ĉeestantoj, kaj esperantistoj havos prioritaton. Skribu do por rezervi vian spacon al [madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es), kaj por scii kiom da homoj intencas veni.

### TAGO KAJ NOKTO DE LA LIBROJ

Kiel ĉiam en aprilo okazos la Tago de la Libro, ĉirkaŭ la datreveno de la morto de Cervantes, kaj la lingvo Esperanto estos publika rolulo en Madrido en almenaŭ du okazoj.

Esperanto denove rolos dum la sinsekva kompleta legado de la verko Don Quijote de La Mancha, en la Círculo de Bellas Artes, okaze de la Tago de la Libro. Por tio ni rezervis vicon (fakte, du vicojn) la merkredon 24an de aprilo, je la 18:30. Volontuloj, prefere tiuj, kiuj neniam partoprenis tiun ĉi eventon, skribu al la adreso: [madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es).

La 26an de aprilo disvolviĝos nova celebrado de “la Nokto de la Libroj”, kiun organizas la Registaro de la Madrida Regiono, ĉijare kun speciala atento al la figuro de Federico García Lorca, en la centa datreveno de lia veno al Madrido. Madrida Esperanto-Liceo estis denove invitita, kaj ni partoprenos per prelego kun omaĝo al Lorca, kaj la tradukoj de liaj verkoj al Esperanto, kun titolo “*Lorca, un poeta extremadamente universal y extremadamente local*”. Ĝin gvidos Miguel Fernández, en nia sidejo, la 26an, vendrede, je la 20,00 horo. Ĝi estos malferma al ĉiuj interesitoj, kaj disvolviĝos en la hispana, do bv. informi viajn amikojn kaj simpatiantojn.

### ALIAJ RENKONTOJ

Krom tiuj specialaj renkontoj, ni daŭrigas niajn kutimajn, ĉiujn lundojn, foje kun invititoj. La 1an de aprilo ni atendas la ĉeeston en nia sidejo de la prezidanto de la asocio SERVAS. Tiu ĉi estas ne registara organizaĵo dediĉita al la strebo al paco per vojaĝo kaj gastigado, kies nomo



devenas el Esperanto, kaj kiu dediĉos al nia lingvo parton de la programo de sia venonta kunveno en la urbo Salamanko. Venu se vi deziras koni pli pri ilia agado.

Por la sekva lundo, la 8an, anonciĝis la ĉeesto de brita komencantino, kiu vizitos la sidejon por koni la madridajn esperantistojn.

Alia vizitanto, ĉikaze el Italio, sin anoncis por la venonta unuasabata renkontiĝo, kiu okazos la sabaton 6an de aprilo, je la 17,00 horo en la kafejo VIPs de la t.n. Placo de Kuboj, apud Placo de Hispanio.

Memoru krome ke komence de majo okazos en Malago la 78-a Hispana Kongreso de Esperanto. Jam pluraj madridanoj aliĝis al ĝi, kaj oni pensis pri la ebleco organiziĝi por vojaĝi per aŭto; se tiel, bv vin anonci ĉe MEL. Ni profitas la okazon por atentigi ke la organizantoj informis ke en aprilo oni ne certigas la disponeblecon de ĉambroj por gastoj en la kongresejo, kaj do se vi intencas iri, bv aliĝi kiom eble plej baldaŭ. Vidu informojn en <http://esperanto-andalucia.info/>.

## **TAGO DE POEZIO**

Kiel ni anoncis en la pasinta numero, la sabaton 23an de marto oni celebris malferme en Radio Utopía omaĝon al la poeto José Agustín Goytisolo pro la dudeka datreveno de lia morto. Estis deklamitaj pluraj poemoj ne nur de Goytisolo sed ankaŭ de la poetoj partoprenintaj. Deklamis interalie: Miguel Fernández, kiel unu el la organizantoj, prezentita kiel poeto en Esperanto, Jorge Camacho kaj Ana Manero. Eblas elŭti kaj aŭskulti la elsendon en mp3 en la retejo de la Radio: <http://www.radioutopia.org.es/>.



Ni ankaŭ havas registron de alia anoncita aktivado: la omaĝo al alia kataluna poeto, feliĉe vivanta, Joan Margarit, la 21an de marto, en la Fakultato pri Filologio de la Universitato Complutense de Madrido, en kiu estis inkludita la legado de poemo tradukita al Esperanto fare de Jorge Camacho. En tiu ĉi ligilo eblas spekti la legadon fare de Andy Hernández: <https://www.youtube.com/watch?v=w9HiXln8KOE&t=4680>

## **KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ**

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30. Pri la unuasabata renkontiĝo, atentu la modifon de la loko, menciitan antaŭe.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrid/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/).

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

## madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [nivocho@gmail.com](mailto:nivocho@gmail.com)